



Programma

Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort', Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld. Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

	<p>Prettige feestdagen gehad? Een heel leuk 2010 gewenst!</p>	
<p>Woensdag 13/01/10</p>	<p>La mondo de la vortludoj – Marc Vanden Bempt Met beeldmateriaal</p>	<p>19:30- 22:00</p>
<p>Woensdag 27/01/10</p>	<p>Daŭriga kurso / Vervolgcurcus Esperanto</p>	<p>20:00- 22:00</p>
<p>Zaterdag 06/02/2009</p>	<p>S.I.A. por la tuta Belgio (kaj ĉirkaŭaĵo) Dit jaar in Winksele (voor het juiste adres, zie verder)</p>	<p>10:00- 20:00</p>
<p>Woensdag 10/02/10</p>	<p>Avondprogramma (nog te bepalen)</p>	<p>19:30- 22:00</p>
<p>Woensdag 24/02/10</p>	<p>Daŭriga kurso / Vervolgcurcus Esperanto</p>	<p>20:00- 22:00</p>
<p>Woensdag 10/03/10</p>	<p>Mi vojaĝis tra Sud-Etiopio – Helena Van der Steen Met film- en beeldmateriaal</p>	<p>19:30- 22:00</p>
<p>Woensdag 24/03/10</p>	<p>Daŭriga kurso / Vervolgcurcus Esperanto</p>	<p>20:00- 22:00</p>

ESPERANTO 3000

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso /
Contactadressen**

info@esperanto3000.be

Karekietenlaan 14, 3010 Kessel-Lo
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;
rogergoris@versateladsl.be
Frans Croon (voorz.), Bukestraat 16, 1910
Kamphenhout-Buken (016 655 944;
frans.croon@kamphenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap
E.3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = 25,-€

= Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)
Idem/same + Monato = 73,-€

www.esperanto3000.be

Membreco / Lidmaatschap UEA

membro/lid UEA = 10,-€
same/idem + jarlibro = 24,-€
same/idem + Esperanto 60,-€

**Abonoj / Abonnementen
(2008)**

Esperanto 3000 = 12,50€ (nl/eo)
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)

Horizon-taal = 25,-€ (nl/eo)

Monato = 49,-€, por ĉiuj (eo)

Ret-Monato = 29,40€, por ĉiuj (eo)

Agenda "La Jaro" 5,-€ (eo)

Vertikale = 5,-€, por aktivuloj (eo)

Esperanto (UEA) = 38,-€ (eo)

Juna Amiko = 14,-€, por infanoj (eo)

La Gazeto (OSIEK) = 29,-€ (eo)

Kosmos = 9,40€ (eo)

Litova Stelo = 14,-€ (eo)

Kontakto = 23,-€, komencantoj (eo)

Spegulo = 22,-€

ILEI + Int. Pedagogia Revuo = 20,-€ (eo)

Reklamo / Reclame

1 p. 10€, 1/2 p. 6€, 1/4 p. 4€, 1/8 p. 3€
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

Ĝenerale / Allerlei

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk de
gewenste categorieën aan te geven.

De la redakcio

Hopelijk iedereen
wel en gezond op
post om dit
nieuwe jaar te
starten!

Esperanto Leuven viert weer feest
op 6 februari 2010 ter gelegenheid
van de Internationale Week van de
Vriendschap.

Met veel vreugde zien wij uit naar
dit evenement. Oude vrienden terug
zien, nieuwe vrienden maken, wat is
er beter in het leven? Zeker in deze
"crisis"tijd is dat hartverwarmend.

Wij staan al te popelen om u weer
te zien ... U toch ook??

Tot dan,

De redactie.

Kunlaboris, alfabete:

Nele Hiers (nalezén nl), Marc Vanden Bempt
(nalezén eo + sendado), Helena Van der
Steen (redaktoro), la aŭtoroj (vidu ĉe la
artikoloj).



Amikeco trans limoj

Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van
Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven
Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor
teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk.

Persona invito

Kara amiko,

Tiun ĉi numeron de "ESPERANTO 3000" ni sendas **persone al vi**.

Ni ja volas inviti vin kaj viajn familianojn kaj konatulojn al **senpaga** Festotago okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 2010, kiu okazos en Lovenen en **sabato la 6-a de februaro 2010** ekde la 10a matene ĝis la 8a vespere.

La ejoj estos agrablaj etosplenaj skoltaj lokaloj tuj apud Leuven, en Winksele (Snoy et d'Oppuerslaan 23).

Temo: «Vortludoj»

Vi trovos la programon, praktikajn informojn kaj pli ampleksan priskribon de la Festotago en ĉi tiu revuo. Ni sukcesis prepari ampleksan kaj allogan programon, kun pluraj eroj eĉ samtempaj. Tiel ĉiu trovos sian guston.

Por ke la Festotago sukcesu, necesas ke partoprenu ĝin **la tuta esperantistaro el Belgio kaj sufiĉe da eksterlandanoj**. Tial ni invitas, per alsendo de ĉi tiu speciala numero, ankaŭ niajn geamikojn el niaj najbaraj landoj.

Vi do nepre venu!

Eble vi konas aliajn geesperantistojn, kiujn ni ne konas aŭ kiujn ni tamen forgesis. Aŭ nederlandlingvanojn kiuj emas partopreni la serĉpromenon kaj/aŭ fotadon? Bonvolu inviti ilin ankaŭ. Dankegon!

**Salutas vin, ĝis baldaŭ en Winksele!
La estraro de Esperanto 3000 vzw Leuven.**



WEEK VAN DE

INTERNATIONALE VRIENDSCHAP

Het tweejaarlijkse feest ter gelegenheid van de Week van de Internationale Vriendschap zal opnieuw in Leuven plaatsvinden op zaterdag **6 februari 2010** vanaf 9.30 uur 's morgens tot 20.00 uur 's avonds.

Ja, we vieren ons feest iets vroeger dan de officiële week, maar dat is dan ook niet het enige nieuwe eraan!

De ontmoetingsplaats is het echt aangename en sfeervolle jeugdhuis van de scoutsvereniging in Winksele nabij Leuven (Snoy et d'Oppuerslaan 23).

Het vermaarde en overvolle buffet dat vroeger 's avonds werd uitgesteld, zal nu tijdens de lunch voorzien worden. Wij weten uit ervaring dat het buffet alleen al de moeite is om te komen.

's Avonds voorzien wij een broodbuffet (vroeger was dat 's middags) voor al diegenen die het wensen.

Ook de zoektocht is in een nieuw kleedje gestoken.

Het gratis programma loopt voornamelijk overdag. De avond reserveren wij om informeel en gezellig te kunnen babbelen met elkaar. Het hoofdthema voor het volledige programma - zie verder in deze Revuo - is "**vortludoj**" (woordspelletjes). Wij spelen zowel in het Esperanto als in het Nederlands.

Kom en ervaar het zelf, de ervaring is meer waard dan 1000 woorden. Je hoeft niet te reserveren of op voorhand te verwittigen, gewoon komen ... iedereen is steeds welkom. Meer weten? Via info@esperanto3000 kan je ons desgewenst alles vragen!

Wij rekenen op jou om deze informatie door te spelen via het internet en bijeenkomsten of in je vrienden- en familiekring. En vergeet vooral niet om onze feestdag ook in je eigen agenda te noteren!

Esperanto 3000 vzw Leuven.

Ĉu vi preferas legi en Esperanto? Tiam legu ĉi-apude la samon

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La dujara festo por la Semajno de Internacia Amikeco en Leuven okazos denove en **sabato la 6-a de februaro 2010** ekde la 9a30 matene ĝis la 20a vespere.

Jes, ni festos ĝin iom pli frue ol la oficiala S.I.A. mem. Sed ne nur tio estos novaĵo!

La renkontiĝejo estas la vere agrabla kakj etosplena junuldomo de la skolta asocio, tuj apud Loveno, nome en Winksele (Snoy et d'Oppuerslaan 23).

La fama abunda (antaŭe vespera) bufedo iĝos tagmeza bufedo kaj la regulaj partoprenantoj scias ke eĉ nur ĝi estas jam sufiĉa kialo por veni.

Vespere ni proponas intertempe same faman panmanĝon, kiu antaŭe estis la vespermanĝo.

La serĉpromeno ankaŭ havos novan formon.

La senpaga programo koncentriĝos en la tago, la vesperon ni rezervas por neformala babilado. Por la plena programo (vidu aliloke en ĉi revuo), la ĉeftemo estos "**vortludoj**", ni vortludos en Esperanto kaj ne nur tio.

Venu kaj spertu mem. La praktiko ja pli valoras ol mil vortoj. Ne necesas antaŭaverti pri alveno, nur veni gravas kaj ĉiu estas bonvena.

Petu deziratajn aldonajn informojn pere de **[info@esperanto3000!](mailto:info@esperanto3000)**

Ni kalkulas je vi por anonci tiun informon en viaj retejo, retgrupoj, kunvenoj, aranĝoj, familio, geamikaro,...

Paĝo 6

Esperanto 3000

Kaj nepre mem ankaŭ notu ĝin en via agendo.

Esperanto 3000 vzw Leuven.

**Heb je nog wat problemen om Esperanto te lezen?
Kijk dan vlug naar de Nederlandse tekst hiernaast!**

La tagmeza bufedo

Ĉu ankoraŭ necesas prezenti la bufedon de la festo de la Semajno de Internacia Amikeco?

Tiam certe vi partoprenos nur la unuan fojon! Do por vi speciale jen:



Vi ankaŭ nun komencos per supo.

Poste vi povos elekti el vianda kaj fiŝa bufedo kun abunda elekto de legomoj.




Manĝu ĝis plene malaperis via malsato, vi rajtas manĝi laŭplaĉan kvanton.

Vi finos per desertbufedo, do tamen lasu ankoraŭ iom da loko en stomako por ankaŭ ĝin ĝui.



La vespera panbufedo



La vespera bufedo de la festo de la Semajno de Internacia Amikeco komenciĝas per supo.

Sekvas pano kun diversaj aldonajoj: ŝinko, ovoj, salamo, fromaĝo, konfitaĵo, freŝa fromaĝo,...

Ne forgesu viziti nian trinkejon por havigi al vi kafon, teon aŭ alian akompanan trinkaĵon.

Ĉio je prezo neimageble malalta!

Nia oferto - Ons aanbod

Abunda Tagmeza bufedo nur 10,00 €
 Uitgebreid Middagbuffet

Vespera panbufedo nur 5,00 €
 Avond-broodbuffet

Trinkkuponoj - Drankbons 1,25 €
 Tombolo/a 2,00 €
 Amikeckarto (+ poŝtmarko) - Vriendschapskaart (+ zegel) 1 kupono
 Serĉpromeno - Wandelzoektocht 1 kupono

Nia trinkeja oferto

Kafo - taso 1 kupono
 Teo - taso 1 kupono
 Supo - suppokaletto 1 kupono
 Torto - peco 2 kuponoj

Oranĝsuko - glaso 1 kupono
 Coca-cola kolao - 33cl 1 kupono
 Coca-cola 'light' kolao - 33cl 1 kupono
 Toniko - 33cl 1 kupono
 Ŝprucakvo - 50cl 1 kupono
 Simpla akvo - 50cl 1 kupono

Stela Artŭa (pilsena) - 25cl 1 kupono
 Blanka Hugard'n - 25cl 1 kupono
 Kriek Lindemans - 33cl 2 kuponoj
 Okcidentmala Trapisto bruna - 33cl 2 kuponoj
 Duvel - 33cl 2 kuponoj
 Blanka aŭ Ruĝa vino - glaso 2 kuponoj
 Blanka aŭ Ruĝa vino - botelo 7 kuponoj

SIA - la programeroj

(senpage alireblaj



gratis toegankelijk)

- 09:15 – 12:00 Serĉpromeno (revenu antaŭ la tagmanĝo!)
 10:00 – 12:00 Lud-labor-sesio de FEL - Lode & Kevin
 "Volontula laboro por Esperanto (kaj ties leĝoj)"

12:00 – 13:45 Varia kaj abunda bufedo – sen limo je kvanto

- 13:50 – 14:00 Formala bonvenigo - nia prezidanto Frans Croon
 14:00 – 15:30 La mondo de la vortludoj - Marc (en Esperanto)
 Kriptogramoj - Lode (en Esperanto)
 Skrabloludado - Martin (en Esperanto)
 Serĉpromeno (redonu la formularon antaŭ la 18a horo!)
 15:30 – 16:00 Paŭzo - tombolo kaj amikeckartoj
 16:00 – 17:30 La Granda Simbola Kvizo - Ilse (en Esperanto)
 Diversaj vortludoj - Bart (en Esperanto)
 Serĉpromeno (redonu la formularon nepre ĝis la 18a horo!)

18:00 – 19:00 Vespera panbufedo – sen limo je kvanto

- 18:50 – 19:00 Disdonado de la premioj por la serĉpromeno kaj por la revuaj vortludoj
 19:00 – 22:00 Neformala daŭrigo

Daŭre:

- 9:30 – 22:00 Trinkejo
 9:30 – 16:00 Tombolo & amikeckartoj (ĉe la kaso)
 9:30 – 18:00 Libroservo
 9:30 – 18:00 Kaso (poste ĉe la trinkbudo)

Lud-labor-sesio FEL (Lode kaj Kevin)

Lode kaj Kevin proponas ludon por ĉiuj grupgvidantoj (respondecaj pri volontuloj) kaj por la volontuloj mem, por lerni pri la novaj leĝoj pri volontuloj. Ili prezentos - fakte ludigo s- ĝin. Ne estas limo pri partoprenantoj. Se ĉeestos 5 homoj, ni ludos normalan kvarteton. Se ĉeestos tro da homoj (ekz. 20), ni ludos per teamoj, kie homoj en teamo povos inter si diskuti pri certaj demandoj.

La mondo de la ludo (Marc)

La mondo de la ludoj konstante evoluas, ĉiumonate aperas novaĵoj. Ni provos prezenti superrigardon de la vortaj ludoj inkluzive de kelkaj etaj konkretaj ludoj.

Kriptogramoj (Lode)

Lode klarigos (en Esperanto) kaj ludigos la konatan ludon.

Skrabloludado (Martin)

Martin klarigos (en Esperanto) kaj ludigos la konatan ludon.

La Granda Simbola Kvizo (Ilse)

Ilse arigis amason da simboloj, pri kiuj vi povos montri viajn konjn. Ĉar la simboloj estas desegnoj aŭ internaciaj mallongigoj, ankaŭ miksitaj teamoj kun esperantoparolantoj kaj neesperantoparolantoj povos ĝui la kvizon ka ... gajni. Partopreni tamen pli gravas ol gajni.

Ook niet-Esperantosprekers zullen kunnen meehelpen in deze kwis die, zij het in Esperanto, over symbolen gaat.

Diversaj vortludoj (Bart)

Bart klarigos (en Esperanto) kaj ludigos kelkajn malsamajn vortludojn: Boggle, Rulvorto kaj Staplovorto. Eble li eĉ faros konkurseton el tio.

Serĉpromeno - Wandelzoektocht (Helena)

Kiel ĉiam ankaŭ en ĉi tiu eldono de la Festo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, Esperanto 3000 prezentas novan serĉpromenon. La itinero ne estos longa, vi trovu fotojn laŭ ĝi.

Ĝuu la promenon kaj... redonante vian plenigitan formularon (ĉe la kaso) antaŭ la 18a horo, vi eĉ eble gajnos belan premion. Sukceson!

Zoals altijd stelt Esperanto 3000 ook tijdens deze uitgave van het feest van de Week van de Internationale Vriendschap een nieuwe wandelzoektocht voor. Het traject is niet lang, je moet onderweg foto's terugvinden.

Geniet van de wandeling en ... door je ingevuld antwoordformulier (aan de kassa) af te geven vóór 18 uur, kan je een mooie prijs winnen. Succes!

Fotoj pri la tago - Foto's over de dag

Fine de la tago, vi eble havos eblecon retrorigardi tiun saman tagon, per fotoprojekciado. Sen komentoj sed ... eble vi rekonos vin mem en iu aŭ eĉ kelkaj fotoj? Ne miru se iuj tamen komentos ☺

Op het einde van de dag zal je misschien de gelegenheid hebben terug te kijken op diezelfde dag, met een fotoprojectie. Zonder commentaren maar ... misschien herken je jezelf wel op een of enkele foto's? Wees niet verwonderd als de een of ander toch commentaar geeft ☺



Du maljunuloj venis al restoracio kaj mendis unusolan pladon de kokinaĵo, terpomoj kaj salato.

Ricevinte la pladon la edzo tranĉdividis la kokinaĵon en du egalajn partojn kaj metis la duonon en la edzinan teleron. Poste li prenis duonon de la terpomoj kaj duonon de la salato kaj metis ilin en ŝian teleron.

La rigardanta kelnero ne povis plu elteni kaj demandis la edzon: "Sinjoro, kial vi ne mendis du pladojn?"

Respondis la edzo: "Mia edzino kaj mi ĉiam dividas ĉion!"

Tiam la edzo komencis manĝi dum la edzino estis sidanta trankvile kaj ankoraŭ ne manĝis.

Denove la kelnero ne povis elteni kaj demandis ŝin:

"Sinjorino, kial vi ne manĝas?"

Respondis ŝi: "Mi atendas la dentojn".

(dankon Josef Shemer)



Uit vorige edities



Kial partopreni?

- ☆ Ĉar ĉi S.I.A. festo estas organizata por la tuta Belgio kaj ... tute sen-paga
- ☆ Ĉar ĉi tiun feston partoprenos pli ol cent aliaj esperanto-parolantoj
- ☆ Ĉar la prelegantoj estos elstaraj
- ☆ Ĉar la tagmeza bufedo estos abundega, eĉ nur pro tio indas partopreni
- ☆ Ĉar la prezoj por manĝoj kaj trinkaĵoj estas malaltaj
- ☆ Ĉar la programo ofertas elekteblon el pluraj eroj samtempaj
- ☆ Ĉar viaj amikoj kiuj ne parolas Esperanton ankaŭ povas partopreni: la serĉpromeno estas dulingva (nl/eo) kaj la manĝoj alireblas por ili ankaŭ
- ☆ Ĉar jen fama tradicio deponit 1979(!), organizita nun nur ĉiun duan jaron
- ☆ Ĉar vi ja ne volas maltrafi iun ajn S.I.A.-feston en Loveno, ĉu?
- ☆ Ĉar eblas senpage parki aŭton proksime
- ☆ Ĉar vi ne devas aliĝi antaŭe. Ni jes bonvenigas vian sciigon pri partopreno, sed vi ankaŭ rajtas lastmomente kaj neanoncite partopreni...
- ☆ Ĉar nia SIA festas la Semajnon de Internacia Amikeco

Waarom je zou komen?

- ☆ Omdat dit SIA-feest georganiseerd wordt voor heel België en helemaal gratis is
- ☆ Omdat er meer dan honderd andere deelnemers aanwezig zullen zijn
- ☆ Omdat de sprekers welbekend zijn in Esperanto-kringen
- ☆ Omdat het middagbuffet overweldigend is, alleen daarvoor al loont het de moeite te komen
- ☆ Omdat de prijzen van de buffetten en drank zeer democratisch zijn
- ☆ Omdat het programma verschillende parallele mogelijkheden biedt
- ☆ Omdat je vrienden die geen Esperanto spreken kunnen meekomen: de zoektocht is tweetalig (nl/eo) en de buffetten zijn ook voor hen
- ☆ Omdat dit een tweejaarlijkse traditie is sinds 1979(!)
- ☆ Omdat je een SIA-feest in Leuven zeker niet wil missen, toch?
- ☆ Omdat je zonder parkeerkosten vlakbij kan parkeren
- ☆ Omdat je niet op voorhand moet inschrijven, je kan gewoon komen opdagen...
- ☆ Omdat onze SIA de Week van de Internationale Vriendschap viert

Esperanto is ontstaan vanuit het besef dat taalgrenzen ook vriendschapsgrenzen zijn. Met Esperanto kunnen we in de praktijk taalgrenzen afschaffen en zo vriendschap smeden van mens tot mens, over grenzen van taal, ras, politiek en andere heen.

Amikeco trans limoj

aperis en la revuo Esperanto, oktobro 1968, p. 137



Jam de la komenco Esperanto krom la celo doni al la mondo internacian lingvon ankaŭ havas bazan ideon, kiun oni ofte nomis "la interna ideo".

Kelkfoje ĝi ĉe iuj aperis troigita, sekteca, kaj tiam ĝi nepre estis malutila al la afero mem. Sed en sana kaj nesekteca formo tiu ideo estas nature ligita al la nocio de tuthomara lingvo, jes eĉ necesa por la venko de la Internacia Lingvo.

Zamenhof esprimis la ideon jene: **"Frateco kaj justeco inter la popoloj"**. Profesoro Lapenna diris (festparolado 1956), ke la bazaj ideoj de la Internacia Lingvo estas: **"unue egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do, neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo, due tuthoma solidareco kaj respekto de la homaj rajtoj, formulitaj nun tute klare en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, trie libereco .."**

Semajno de Internacia Amikeco volas esprimi tiun ĉi "internan ideon" per aliaj vortoj: Amikeco trans limoj -- limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj. Sed ni ne nur bele vortumas la ideon, ni ankaŭ volas konkretigi ĝin per agoj ĉe esperantistoj kaj ĉe aliaj.

La Semajno ankaŭ celas krei fortan, belan tradicion inter la esperantistoj kaj samtempe fari Esperanton konata al vasta publiko en tute nova maniero, kiun oni antaŭe ne uzis en la priesperanta infarmado.

La Semajno okazos la unuan fojon en februaro 1969, 16-an - 22-an.

Ĉiu Landa Komitato sufiĉe frue antaŭ la Semajno informu la gazetaron, la radion kaj la televidon en sia lando, ke la Esperanto-movado okazigos Semajnon de Internacia Amikeco, pri ĝia celo kaj la aranĝoj.

Kompreneble oni akcentu al la gazetaro, ke la Semajno ne nur estas por esperantistoj, sed por ĉiuj homoj. Oni povas mencii la streĉitecon en la mondo kaj ke tial ni des pli bezonas personan amikecon trans la limoj, ke tio kontribuas al la konservado de la paco.

Oni povas doni kelkajn sloganojn de la Semajno, ekz.

"Kulturu amikecon per afableco" aŭ "Amikeco faras la vivon pli riĉa".

Oni presigos specialajn salutkartojn okaze de la Semajno. Ili povas surhavi kelkajn simplajn frazojn en tri, kvar lingvoj. Kompreneble Esperanto devas esti inter ili. Ĉar ili estos plurlingvaj, ili estos uzeblaj ankaŭ de neesperantistoj. Mi proponas la nomon **"amikokartoj"**.

La Landaj Komitatoj presigu afiŝetojn kun ekz. la sekvanta teksto:

Semajno de Internacia Amikeco. Memoru viajn amikojn en ...ujo kaj eksterlande, sendu al ili dum la Semajno saluton (uzu amikokarton), donacon, ekz. libron, skatolon de ĉokolado aŭ florojn.

Afableco naskas amikecon. Amikeco faras la vivon pli riĉa, tial kulturu ĝin. Jen vi havas okazon.

La Loka Komitato aperigu tiajn afiŝetojn en butikoj (ekz. flor-, libro- kaj ĉokoladvendejoj). La butikistoj volonte aperigos ĝin kaj ev. eĉ pagos sumeton por ĝi.

La afiŝetoj kompreneble estos en nacia lingvo sed havu du frazojn en Esperanto:

- 1) "Semajno de Internacia Amikeco" (sub la nacia nomo de la Semajno) kaj
- 2) "Amikeco trans limaj", frazo, kiu estas en la emblemo de la Semajno.

En multaj urboj, kie oni havas ĝemelan alilandan urbon, oni povus fari publikan feston, invitante la urbestron fari paroladon k.s.

Mi proponas, ke ĉiu Esperanta klubo aŭ societo havu festan kunvenon la sabaton, antaŭ ol komenciĝos la Semajno. Jen parto de la proponita tradicio de la esperantistoj.

En tiu kunveno oni komune skribu "amikokartojn" al eksterlandaj esperantistoj.

Cetere ĉiu esperantisto devus uzi la "amikokartojn" dum la Semajno, sendante salutojn ne nur al esperantistoj sed ankaŭ al neesperantistaj amikoj.



Belaj **amikeckartoj** haveblos en la kunvenejo. Kunportu viajn adresojn!

La emblemo



Ĝi estas la "varmarko" de la Semajno kaj propraĵo de UEA. Ĝi ĉiam devas esti uzata ekzakte en la fiksita formo (logotipo). Ŝanĝetojn oni ne rajtas fari, kaj oni ne rajtas ĝin misuzi, t.e. por aliaj celoj.

La Internacia Komitato nun ege bezonas helpantojn ĉie en la mondo. Ĉiu landa asocio estas petata elekti Landan Komitaton kaj informi nin pri ĝia adreso.

Ni konscias, ke nur parteto de la programo povos esti plenumita la unuajn jarojn. Sed ni estas konvinkitaj, ke Semajno de Internacia Amikeco estos afero ĉiame kreskanta, ke post 5 - 10 jaroj la tuta mondo festos ĝin. Tio signifas, ke ĉiu homo scios aŭ scietos, kio estas Esperanto, ke ĝi estas internacia lingvo kun la ideo de amikeco.

de Erik CARLÉN

aperis en la revuo Esperanto, oktobro 1968, p. 137

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO



Nia Ludoviko esprimis la ideon jene: «Frateco kaj justeco inter la popoloj».

Profesoro Lapenna diris (festparolado 1956), ke la bazaj ideoj de la Internacia Lingvo estas: **«unue egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do, neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo, due tuthoma solidareco kaj respekto de la homaj rajtoj, formulitaj nun tute klare en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, trie libereco... ktp».**

Semajno de Internacia Amikeco naskiĝis ĝuste por esprimi tiun ĉi «internan ideon» per aliaj vortoj: Amikeco trans limoj - limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj.

La Semajno okazis la unuan fojon en 1969, februaro 16a-22a.

Ĝia iniciatinto estis la fama sveda esperantisto Erik Carlén kiu antaŭvidis laborplanon kaj aparaton por prizorgi ĝin kaj fiksas ĝian daton: ĉiujare en la lasta plena semajno de februaro.

Ni povas diri ke ĝi estis kreita de parolantoj de la Internacia Lingvo por agnoski la valoron kaj plezuron de amikeco trans naciaj limoj per Esperanto.

Sed la Semajno de Internacia Amikeco havas du pliajn celojn.

Unue, plifortigon kaj plivigligon de la kontaktoj inter esperantistoj en diversaj landoj, due, informadon pri nia lingvo kaj movado en neesperantistaj rondoj.

Multaj grupoj, asocioj kaj eĉ Landaj Asocioj sekvis la instigon de Carlén kaj diversspecaj agadoj floris por celebri tiun Semajnon.

Inter la multaj, permesu citi nur unu ĉar tre bone elpensita, grava kaj involviĝinta esperantistojn el diversaj landoj: tio estas la semajno de internacia amikeco de la grupo **"Esperanto 3000"**, el urbo Lovenno, Belgio.

Bedaŭrinde, iom post iom celebrado de S.I.A., en ĉiu lando, malvigligis, malbuntigis... Nur kelkaj grupoj obstine plu tenas la tradicion, ne necese grandioze, sed konstante.

Tempo forpasis, labormetodoj ŝanĝiĝis, homoj ne plu estas la samaj, burokrataj aparatoj malmodiĝis.

Sed... Semajno de Internacia Amikeco povas daŭrigi sian vojon: pli simplan, pli elastan, pli modernan.

Cetere, en la esperantista komunumo kiajn aliajn tradiciajn festotagojn ni havas? Kaj krome ni provizas nin pri plua ebleco informadi pri esperanto, pri nia "popolo", pri niaj agadoj.

La dato jam estas ĉe la pordo, preparu vin kaj vian planon, verŝajne vi jam faris.. kaj se tiu dato por via lando aŭ urbo maltaŭgas, elektu alian pli konvenan. Ne estu tio ĉi kialo por rezigni, gravas agadi, kaj kompreneble en plej efika maniero.

Memoru ke ekzistas ankaŭ emblemo: tio estas la «varmarko» de la Semajno, bonvolu uzi ĝin, sed en la fiksita formo.

Semajno de internacia amikeco: ne nur bele vortumu la ideon, konkretigu ĝin per agoj! Vi ja sentos vin pli bone!

Dankon por la atento kaj korajn salutojn. Sukcesan laboron!



Edvige Tantin Ackermann
Komisiito por S.I.A.

Voor de kindjes ... klein en groot

Kan je dit oplossen?



+



D=S

P=M



FL=CH



+



A=E

Oplissing :

Op volgende pagina kan je twee vriendjes inkleuren
Breng deze ingekleurde tekening mee naar de SIA, wie weet ontvang
je iets lekkers in de plaats!

Vergeet niet je naam en leeftijd te vermelden :



Alia teksto de Edvige

La lasta plena semajno de februaro estas festata en la Esperanto-movado kiel la Semajno de Internacia Amikeco (SIA).

Ĝi celas plivigligi kontaktojn inter esperantistoj de diversaj landoj kaj krei kaj plifortigi iliajn ligojn kun rondoĵ ekster la Esperanto-movado.

Jam de multaj jaroj s-ino Edvige Ackermann (Italio) estas komisiito de UEA pri la Semajno...

"Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj.

Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto.

En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floradu kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj".

Tiel Erik Carlén, antaŭ pli ol 35 jaroj anoncis la belan ideon pri la starigo de ĉiujara Semajno de Internacia Amikeco, kiu poste fariĝis tutmonda tradicio de la Esperanto-medio.

La tiama vicprezidanto de UEA formulis sian ideon per la simpla la devizo:

INTERKOMPREENIĜO + AMIKIĜO = ESPERANTO.

Al la origina ideo oni povas aldoni plurajn aliajn signifojn, laŭ propraj vidpunktoj kaj sugestoj de la medio, tamen tiu simpla adicio pleje respegulas la esencan fonon de la lingvo internacia: egaleco inter homoj kaj nacioj; solidareco inter ĉiuj gentoj; kaj respekto de homaj rajtoj.

Fakte amikeco ne estas kruda vorto; kontraŭe, ĝi estas intima sento-vorto, kiu nature ŝvebadas en la Esperanta komunumo.

Kiam la svedo Erik Carlén proponis, ke la lasta plena semajno de februaro estu dediĉata al tiu ideo, tra la mondo oni entuziasme akceptis la proponon kaj eĉ gravuloj aprobis ĝin.

Ekde tiam Esperantaj grupoj klopodas okazigi dum la lasta semajno de februaro manifestaciojn, renkontiĝojn kaj ceremoniojn por atentigi, ke paco ekestos, kiam iu konsideros la aliulon kiel propran sinceran amikon.

Pro diversaj lastatempaj fenomenoj en la mondo (maltoleremo, etna malamo, terorismo, ktp.), la Esperanto-movado devas ĉiam pli engaĝiĝi en la disvastigon de siaj idealoj, kiuj estas strikte ligitaj al la lingvo mem, kaj de siaj konceptoj pri interpopola dialogo kaj interkompreniĝo spite al ĉia diverseco.

Necesas aktivi por homaranisma helpo al malplibonŝanculoj kaj al popoloj suferantaj, kune kun la aktivado por la idealoj de Unesko pri konservado de la kultura riĉeco de la mondo.

Ne estas malfacile eltrovi manieron kaj ilojn por antaŭenigi la senton de amikeco kaj solidareco. Jen kelkaj belaj agadoj por kono kaj ebla imitado fare de aliaj.

Tre bone agas jam delonge la Esperanto-grupo en Leuven, Belgio, kiu organizas dum SIA aranĝon imponan. En la riĉa programo estis desegnokonkurso por infanoj, vizito al muzeo, prelegoj pri diversaj temoj, Esperanto-kursetoj, prezentoj de libroj, akcepto ĉe la urbestro, vespera bufedo, ludoj, koncerto, k.t.p.

En oficiala deklaro okaze de SIA 2004 la urbestro de Leuven, s-ro L. Tobbacq, diris i.a.:

"La urbo Loveno plene konscias pri la lingva diverseco kaj pri la graveco kaj bezono de kompreno trans landlimoj. Tiu ĉi bezono forte sentiĝas hodiaŭ en la institucioj de Eŭropa Komunumo, sed ankaŭ ekster ĝi, je monda nivelo. Internacia amikeco trans la lingvaj kaj naciaj limoj estas necesa kondiĉo por ke homoj en la tuta mondo komprenu unu la aliajn kaj kunvivu pace. La urbo Loveno volonte malfermas siajn limojn por saluti siajn vizitantojn el aliaj landoj."

Eble la plej longedaŭra tradicio pri mesaĝo de la urbestro okaze de SIA estas en Chicago, Usono, kies Esperanto-societo ĉiam donis grandan atenton al la Semajno en sia agado.

Iluj grupoj aranĝas ekspozicion pri Esperanto kaj la signifo de SIA, aliaj povas organizi muzikan vesperon, forsendon de salutkartoj al geamikoj tra la mondo, prelegojn pri temoj interesaj por la loka publiko, ktp.

Interesa estas la agado de Malta Esperanto-Societo, kiu inter prelegoj kaj muzika prezentado disdonas diplomojn al Esperanto-lernantoj kaj premiojn pro esea konkurso aŭ simile. Ĉar oni invitas ĵurnalistojn al la aranĝo, oni sukcese informas la eksteran publikon.

En la Esperanto-medio estas malmultaj speciale celebrataj datoj, sed certe unu el la plej trafaj estas ĝuste la Semajno de Internacia Amikeco. Ni ekspluatitu tiun ĉi ŝancon. Mi estas volonte je dispono por kunlaboro, sugestoj kaj konsiloj. Bonvolu kontakti min!

Kaj... se vi ion aranĝas, bonvolu informi min kaj mi informos la aliajn, kiuj povos imiti vin kaj ricevi instigon al simila agado.

Edvige Ackermann, Italio
Komisiito de UEA pri SIA

Semajno de Internacia Amikeco

Ekde la unua festojaro la Semajno de Internacia Amikeco (S.I.A.) havis sian propran simbolon, nome 2 manojn super la slogano "Amikeco trans limoj".



El tio oni povas kompreni ke oni ja celis pli ol nur 'internaciecon'. Fakte, ne nur lingvoj limigas landojn, sed ankaŭ aliaj limoj kiuj bremsas la personecon de ĉiu. Tiaj estas rasaj dividoj, kulturpropraj komunumoj, religiaj limoj, politikaj limigoj kaj fine ankaŭ lingvaj limoj kiuj ofte kaŭzas ke bariloj restas pro senhalta manko de komunikadaj eblecoj.

Estas do logike ke la S.I.A. estas lanĉita el la Esperantomedio. Ĉar Esperanto estas pli ol nur la unua dua lingvo por ĉiuj ...

La S.I.A. havas tri celojn:

- ☆ unue ĝi volas ĝuste prezenti la ideologion, nome kontaktojn kaj amikecon trans naciaj kaj aliaj limoj,
- ☆ due ĝi celas plifortigi kaj plivigli la kontaktojn inter esperantistoj en diversaj landoj. Ekzemple ĝi memorigas nin sendi salutojn al esperantistoj, kiujn ni antaŭe renkontis en esperantujo,
- ☆ trie ĝi havas la celon informi pri nia lingvo kaj movado en ne-esperantistaj rondoj.

La origina ideo de la Semajno de Internacia Amikeco estis festi homajn kontaktojn trans naciaj limoj pere de Esperanto, kaj krei komunan tradicion, al kiu ankaŭ ne-esperantistoj el ĉiuj landoj povos aliĝi. La Semajno ekestis

en 1969 esperante ke oni ekster la movado uzu ĝin por atentigi la mondon pri la forta ligo inter internaciaj lingvo kaj amikeco.

Week van de Internationale Vriendschap

(vertaald volgens een artikel van Edvige Tantin Ackerman, zaakgelastigde voor S.I.A. bij de Universala Esperanto-Asocio U.E.A.)

De Week van de Internationale Vriendschap (Semajno de Internacia Amikeco of S.I.A.), die geboren werd in 1969, drukt de "interne idee" achter de internationale taal Esperanto uit, met andere woorden: "Vriendschap over de grenzen" (Amikeco trans limoj) - grenzen tussen naties, rassen, talen, culturen, politiek en godsdienst. Deze ideeën zijn vandaag nog steeds actueel: maar hoe staat het vandaag met de praktische kant van de S.I.A.?

De eerste Week vond plaats in 1969, tussen 16 en 22 februari. Ze was een initiatief van de bekende Zweedse Esperantospreker Erik Carlén (1906-86), vice-voorzitter (1964-74) van U.E.A., die er een werkplan voor uitwerkte en die de datum vastlegde: elk jaar tijdens de laatste volle week (= tot de laatste zaterdag) van februari.



We kunnen zeggen dat de Week gecreëerd werd door de sprekers van de internationale taal als erkenning van de waarde en het plezier van de vriendschap via Esperanto over de nationale grenzen heen.

De S.I.A. heeft echter ook twee andere doelen: ten eerste de contacten tussen Esperantosprekers in verschillende landen versterken en levendigen en ten tweede onze taal en beweging buiten de Esperantokringen bekend maken. Vele groepen en zelfs nationale verenigingen volgden de aansporing van Carlén en allerhande activiteiten bloeiden op om de Week te vieren. Maar, helaas, langzaam werd de Week minder en minder levendig en veelzijdig gevierd en verdween ze bijna. Slechts enkele groepen (waaronder Esperanto 3000) hielden koppig vast aan de traditie - niet noodzakelijk op grote schaal, maar wel constant.

Maar de Week kan wel verder gevierd worden: eenvoudiger, soepeler, moderner - des te meer omdat we nauwelijks andere traditionele feestdagen hebben in de Esperantogemeenschap. De tijd is gekomen om terug aan te knopen bij de gewoonte om ze over de hele wereld te vieren, wat duidelijk past in het kader van de "Kampanjo 2000". Dit is een extra

gelegenheid om informatie te verspreiden over Esperanto, over ons "volk", over onze activiteiten.

Denk eraan dat er ook een embleem bestaat met "Amikeco trans limoj", een echt waarmerk van de Week.

En in Leuven ...

De auteur vervolgt haar artikel, in het decembernummer van 1997 van het tijdschrift "Esperanto" van U.E.A., met een overzicht van de elementen die deel uitmaken van zo'n viering.

Al die elementen worden, zonder enige uitzondering, gecombineerd in de viering die Esperanto 3000 op 6 februari 2010 opnieuw in Leuven organiseert.



We overlopen ze even *en geven aan hoe wij ze invullen*:

- ☆ Ten eerste: breng de massamedia in uw land of stad op de hoogte van het feit dat de Esperanto-beweging de Week van de Internationale Vriendschap zal vieren, waarbij u haar betekenis en activiteiten vermeldt. Druk er uiteraard op dat de Week niet alleen de Esperantosprekers wilt bereiken, maar iedereen; vermeld dat we in de huidige drukke wereld nog meer nood hebben aan - persoonlijke, collectieve of institutionele - vriendschap over de grenzen heen die bijdraagt tot het bewaren van de vrede.

In Leuven sturen we een dertigtal brieven naar de lokale en nationale pers, met het principe van de Week, ons programma en de officiële verklaring van de Stad Leuven en andere instanties en verenigingen.

- ☆ Ten tweede, ten derde enz.: organiseer wat dan ook dat verband houdt met internationale vriendschap. Begin met iets eenvoudigs en ga na enige ervaring over op activiteiten van een hoger niveau en een hogere moeilijkheidsgraad. De volgende punten zijn hiervan voorbeelden.

In Leuven houden we al sinds enkele maanden voor de oprichting van Esperanto 3000 een jaarlijkse viering, tweejaarlijks voor heel België. De eerste keer was dat gewoon een diareeks en mini-boekendienst.

- ✧ In een feestelijke bijeenkomst kan u een gemeenschappelijk onderkende kaart met vriendschapsgroeten versturen aan buitenlandse Esperantosprekers.
In Leuven doen alle deelnemers dit nu ook. Hiervoor ontwierpen we een eigen mooie Vriendschapskaart.

- ✧ Als de groep nabij een landsgrens woont, maak dan een afspraak met een Esperantogroep uit dat buurland, wissel geschenken uit, maak een gezamenlijke uitstap, zorg indien mogelijk voor een ontvangst op het stadhuis om het belang van vriendschap en uitwisseling met burens te benadrukken.
In Leuven wonen we vlakbij Wallonië en het internationaal getinte Brussel. Het spreekt dan ook voor zich dat we alle Frans- en anderstaligen uitdrukkelijk uitnodigen.

- ✧ Stel aan uw stadsgenoten een concert voor - van een koor met liedjes in Esperanto, of van een Esperanto-artiest in uw land - of een tentoonstelling met tekeningen over het thema van de Week.
En vergeet ook niet een kort bericht over de activiteit te sturen naar de lokale massamedia, maar ook aan U.E.A. en aan de Esperantotijdschriften en -radio's.
In Leuven hebben we in het verleden weinig belang gehecht aan de Esperantomedia. Dit jaar echter zullen we ook hen over onze activiteiten inlichten, zowel voor- als achteraf.

Week van de Internationale Vriendschap: druk niet alleen de idee uit in mooie bewoordingen, maar maak ze daadwerkelijk waar!

Week van de Internationale Vriendschap

(vertaald uit het Esperanto)

Vriendschap over de grenzen

Reeds van bij de start had het Esperanto, naast het doel aan de wereld een internationale taal te bieden, ook een basisidee, die men dikwijls de "interne idee" noemde. Deze idee scheen bij sommigen wel eens overdreven, soms deed ze aan sekten denken, en in dat geval was ze zeker schadelijk. Maar in een gezonde en "niet-sectarische" vorm is die idee natuurlijk verbonden met het begrip van taal voor het hele mensdom, ja zelfs nodig voor een overwinnen van de Internationale Taal.

Zamenhof drukte de idee uit als "Broederschap en gerechtigheid onder de

volkeren". Professor Lapenna zei (feestvoordracht 1956) dat de basisideeën van de Internationale Taal zijn: "ten eerste gelijkheid van alle rassen en nationaliteiten, dus een zuiver antiracisme zonder compromis, ten tweede een algehele solidariteit en respect voor de mensenrechten, nu duidelijk geformuleerd in de Universele Verklaring van de Rechten van de Mens, ten derde vrijheid ..."

De Week van de Internationale Vriendschap wilt deze "interne idee" met andere woorden uitdrukken: vriendschap over de grenzen (Amikeco trans limoj) - nationale, rassen-, taal-, culturele, politieke en godsdienstige grenzen. Maar we verwoorden de idee niet alleen mooi, we willen ze ook concretiseren door handelingen bij Esperantisten en anderen.

De Week heeft ook tot doel een sterke en mooie traditie te doen ontstaan tussen de esperantisten en tegelijk het Esperanto bekend te maken aan het ruime publiek op een gans nieuwe manier, die men tevoren niet gebruikte in de informatie over het Esperanto.

Zo verwoordde de toenmalige vice-voorzitter van UEA (1964-74) Erik Carlén uit Zweden (1906-1986), de initiatiefnemer tot de Week van de Internationale Vriendschap, de idee die erachter zit. Dit deed hij in een artikel in "Esperanto" in oktober 1968. De eerste editie van de Week zou hierop volgen in 1969, van 16 tot 22 februari.



In zijn verslag, in "Esperanto" van april 1969, vroeg hij zich af:

Na de eerste Week van de Internationale Vriendschap vragen sommigen misschien: wat bereikte de Esperantobeweging met die activiteit? Is ze echt de moeite waard?

In sommige landen werkte men waarschijnlijk nauwelijks of niet voor de Week, en daar waren dan uiteraard ook geen resultaten te noteren. Maar in andere landen hebben de Esperantisten echt gewerkt en bereikten ze resultaten, die nuttig zijn voor de beweging. ...

De Esperantisten hadden tijdens de Week zeker op een grotere schaal dan

ik weet feestelijke activiteiten in hun groepen over de hele wereld. ... *(hierna volgen verslagen uit Bulgarije, Spanje, Nederland, Zweden en Polen). Carlén besluit:*

Tijdens mijn werk voor een Week van de Internationale Vriendschap sprak ik met veel verschillende mensen, autoriteiten, journalisten, industriëlen, handelaars en dergelijke.

Ik benadrukte dan het ideaal dat de Week wil levend maken: vriendschap over grenzen, gelijkheid en broederlijkheid tussen de volkeren. Dat is immers de interne idee van het Esperanto. Overal - en dikwijls was ik daar verwonderd over - aanvaardde men met enthousiasme die idealen. Dat overtuigde me ervan dat onze tijd opnieuw idealistisch wordt. Hiervoor zijn ook veel andere indicaties. We moeten dus niet beschaamd zijn voor die idee, die men dikwijls benadrukte als zijnde sectarisch en schadelijk in de informatie over Esperanto. Een nieuwe tijd zal zeker komen, waarin ze zeer doeltreffend zal zijn, op voorwaarde dat ze op de juiste manier wordt voorgesteld.

Ik dank iedereen die werkte voor die grote idee: *Amikeco trans limoj* (Vriendschap over de grenzen).

Deze tekst had vandaag kunnen geschreven zijn. Hij is nog even brandend actueel.

Vijf jaar later, in het nummer van maart 1974, schreef Simo Milojevic (momenteel verantwoordelijk voor de boekendienst van UEA) het volgende:

Een vorm die een juiste inhoud zoekt

Gelanceerd voor vijf jaar, zoekt de Week van de Internationale Vriendschap nog naar zijn werkelijke inhoud om te veranderen van nobele idee in een manifestatie op wereldschaal van toenadering tussen de mensen. Alhoewel de idee stamt uit de Beweging, lijkt ze vlugger aan populariteit te winnen bij instanties buiten de beweging.

Het is onverstandig in dit geval een dichter aan te halen, die beweerde, dat de voorwerpen en personen de vorm hebben, die onze geest er aan geeft.

Maar, als we dat toch doen, willen we alleen de persoonlijke rol benadrukken van ieder individu in verband met initiatieven, die een algemene aandacht willen wekken en deze steun ook verwachten.

Eén van die initiatieven, gelanceerd door de Universala Esperanto Asocio (Universele Esperanto-vereniging), is de Week van de Internationale Vriendschap, die zopas plaatsvond van 18 tot 24 februari 1974. Zoals dat niet zelden gebeurt, maakte dit nobele initiatief bijna niet of slechts af en toe en op sommige plaatsen de actieven uit de esperantobeweging wakker; maar ook dit jaar kreeg het een waardevolle ondersteuning vanwege instanties buiten de beweging.

Het weze toegestaan te zeggen dat de W.I.V. (Week van de Internationale Vriendschap; in het Esperanto: S.I.A. = Semajno de Internacia Amikeco) in sommige rondes van de beweging weinig weerklank vond en soms zelfs enkele spottende beweringen losmaakte. De W.I.V. is nauwelijks meer dan een mooi initiatief, alleen een kader, een vaas misschien van willekeurige vorm, opdat men er bloemen zou kunnen in plaatsen, te schikken naar eigen goeddunken.

Het initiatief had nooit tot doel zich te beperken tot het uitwisselen van kaarten met groeten, alhoewel men liefst toch de waarde hiervan niet zou onderschatten, in het geval van personen, waar niemand naar schrijft, die leven in omstandigheden, waarin zelfs een eenvoudige vriendelijke groet de angst en nachtmerries van het dagelijkse leven kan milderen.

De W.I.V. kan die week van het jaar zijn, waarin men de wereld buiten de beweging erop attent maakt, dat de Internationale Taal en haar Beweging (met alle honderden organisaties erbinnen) hun hele activiteit richten naar precies de internationale vriendschap, naar de intermenselijke toenadering.



Over de noodzaak van een neutraal internationaal communicatiemiddel moet men nog lang en met moeite een groot deel van het algemene publiek en des te meer de officiëlen en belangrijke mensen der wereld overtuigen; doch van de noodzaak van internationale vriendschap is iedereen overtuigd. Met de steun van onze initiatieven, met het betonen van simpatie hiertegenover, komt men dikwijls en spijs diplomatieke routine in een situatie dat men

ook meer algemene en belangrijke waarheden erkent ten overstaan van de Internationale Taal en de Esperanto-beweging.

Toen voor twee jaren (1972) de grootstad Chicago in de V.S. een pioniersrol speelde in de steun van buiten de beweging aan het initiatief tot W.I.V. ging men dit zien als een listig uitgelokte vriendelijkheid, als een gebeuren zonder belangrijke weerklank.

Het werd echter duidelijk dat althans in het geval van de V.S. het voorbeeld van Chicago in het volgende jaar (1973) niet alleen door enkele andere steden gevolgd werd (Portland, San Francisco, St. Petersburg, Tampa), maar ook door de hele staat Illinois. Dit jaar blijkt het dat de staat Washington zich aansluit bij de Amerikaanse steungevers aan de W.I.V., terwijl de steun van San Francisco herhaald wordt.

